




Nº 07 - JUL/83

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL



## IMPRESSO

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE B.E.L.

La 25an de la pasinta monato, oni okazigis la unuan Ĝeneralan Kunsidon de BEL en la nuna jaro. La venonta Brazila Esperantisto (N-ro 278, Julio/Septembro) aperigos la tutan protokolon de tiu kunsido. Cetere, ĝi sciigos vin pri la raporto prezentita de la Prezidan to de BEL, rilata al la unuaj monatoj de lia administrado. Pri ŝanĝoj en la estraro, ni informas al vi, ke S-ro Alan Romero, pro privataj kaj profesiaj aferoj eksiĝis el sia posteno. Sekve, estis elektita por anstataŭi lin S-ro Joel Manso, kiu siavice estis anstataŭita de F-ino Valéria O. Santiago. Jen la nova situacio: la Sekretario-Joel Manso - kaj 2a Sekretariino - Valéria O. Santiago.

FUNKCIADO DE B.E.L. DUM JULIO 83

Pro libertempo de nia nura oficistino, la sidejo de BEL restos fermita de la 18a ĝis la 31a de la kuranta monato.

Ni uzas la okazon por informi al vi, ke ordinare nia sidejo restas malfermita al la publiko, de lundo ĝis sabato, de la 10a ĝis la 12a (matene) kaj de la la ĝis la 7a (vespere). Bedaŭrinde, pro manko de volontuloj kaj neebleco dungi plian funkciulon, kelkfoje ni estas devigataj fermi la pordojn de nia sidejo, por plenumi eksterajn taskojn en la bankoj, poŝtagentejoj ktp. Tiel, se vi intencas viziti nin, bonvolu anticipe sinanonci.

ANSTATAUANTO DE KOMITATANO "A" REPREZENTANTA BEL CE UEA

En la 68a U.K., en Budapesto, nia ano José Pedro Milagres, el Niteroi-RJ., anstataŭos - Prof-on Sylla Chaves (Komitatano A reprezentanta BEL) kaj salutos la Kongreson nome de nia Asocio. Tiucele li plurfoje venis al sidejo de BEL por informiĝi pri la ĉefaj proble moj diskutotaj.

Ni kore dankas la Prezidanton de Ilheus Esperanta Grupo, S-ro Eleus Leonardo de Sa, kiu ankaŭ sinoferis por tiu tasko.

TURISMA AUD-VIDA MATERIALO PRI BRAZILO - MENDEBLA CE BEL

Laŭ informite en nia lasta bulteno (BEL-informas n-ro 06), la entrepreno V-SON AUDIOVI - SUAIS E EDITORA LTDA baldaŭ eldonos belegan skatolon kun 80 lumbildoj pri turismaj aspek toj de Brazilo. Akompanos tiun kolekton kasedo kun teksto surbendigita en Esperanto. Interkonsente kun la Prezidanto de KKE, BEL prezentos tiun materialon dum la XVI Brazila - Seminario de Esperanto, en Ouro Preto-MG. Akirebla ĉe la libro servo de la Seminario (Cr\$ 18.000,00) aŭ mendebla ĉe BEL por sendado remburse (Cr\$ 18.000,00 + sendkostoj). Nepre aĉetu tiun belegan materialon. Ĝi estas vere instruiga kaj amuziga.

CÛ NIA ASOCIO BONFARTAS ? KONTROLU VI MEM.

Oni povas diversmaniere memorigi niajn anojn pri la pagendaj jarkotizoj. Jen unu el tiaj

disponeblai memorigiloi.

MEMBRARO	MS	M1	M2	DM	BM	Sume	POR INTELIGENTULOJ		
1982.12.31	226	143	31	23	2	425	DUONVORTOJ		
1983.06.30	193	114	15	23	2	347	SUFIĈAS . Ĉ - n - ?		

SABATAJ POSTKURSAJ KUNVENOJ DE LA LIGO

Kun la celo stimuli la perfektigon de niaj membroj en la parola uzado de E-o, ni planis periode okazigi debatojn pri temoj de ĝenerala intereso, en sabataj postkursaj kunvenoj de la Ligo. La unua FORUMO okazis sabaton, la 2an de la kuranta monato, kiam oni varme debatis pri "Instruado de E-o per la rekta metodo" kaj obeis la fiksitajn subajn regulojn:

"1) Oni uzos nur E-on, nepre sen legado de tekstoj; 2) Parolos minimume 4 personoj : unu prezentos la temon (5minutoj); du parolos respektive "por" kaj "kontrau" la temo ( po 10 minutoj); la kvara gvidos la debatojn - kiujn devos partopreni kiel eble plej multaj ceestantoj - kaj resumos la konkludojn. La tempo por la debatoj kaj konkludoj estos cirkau 30 minutoj".

La venonta "FORUMO" eble okazos la lastan sabaton de la proksima monato. BEL - informas n-ro 8 aperigos detalojn pri la afero.

KIEL IRAS NIA VARBADO POR UEA?

Ĝis la fino de la unua semestro de la kuranta jaro, BEL sukcesis sendi al UEA 19 spezfo liojn. Jen la ciferoj pri la nombro da kotizoj kaj abonoj senditaj al ĝi, laŭ kategorioj:

Property region.	MJ	MA	MJ-K	MA-K	Individuaj Membroj		SZ	PT	SA	Kto	
Name of Persons and Persons an	6	136	4	17	163		1	3	11	28	
_		-	MIRINDAJ	OJ DE NI	A MARO - Preleg	o kun	lumbildoj				

La 16an de la nuna monato, je la 8a vespere, en la sidejo de Academia Pedralva, ce Kulturpalaco (Campos-RJ), nia samideano Alan Romero, nuntempe direktoro de la revuo "MERGULHAR", prelegos, en Esperanto, kun la helpo de belegaj lumbildoj, pri la mirindaĵoj de nia maro. Campos Esperanto-Klubo, Academia Pedralva kaj União Brasileira de Trovadores invitas vin ĉeesti tiun interesan kunvenon.

CAMPOS ESPERANTO-KLUBO: Novaj estraro kaj adreso

La 30an de aprilo ĉijare estis elektita la nova estraro de Campos Esperanto- Klubo por la oficperiodo 83/84: Prez-Vivaldo Marcelino da Silva, Sek-Jayme Alves Patrício, Kas -Luiz Carlos de Oliveira Neto, Dir.pri Instr. - Joel Maciel Soares, Dir.pri Prop. - Joaquim de Paula Codeço, Socia Dir. Katia de Paula, Kontrola Konsilantaro - Rossini Viana-Nunes, Américo Rodrigues da Fonseca Filho e Claudia Lilia Sales de Souza.

Se vi ankaŭ deziras sendi al tiuj samideanoj salutesprimojn kaj bondezirojn, ne forgesu rimarki la ovan adreson de la Klubo: Rua Ten. Cel. Cardoso, 821 - Centro - 28100 - Cam pos - RJ.

PERNAMBUKA ESPERANTO - ASOCIO : Nova estraro

Ankau la 30an de aprilo lasta, estis elektita, por la periodo 83/85, la nova estraro de P.E.A. (Caixa Postal 1139 - 50.000 - Recife - PE) : Prez. - Amaro Pinangé Soares, Vic prez. - Severino Nunes da Costa, Sek. - Jannes Markus Mabesoone, Vicsek. - Geraldo Pi res Sitônio, Kas- Daniel Dorta Moura, Vickas - Maria José Pontes, Bibl. - Carlos Pereira Resende Neto, Konsulta Konsilantaro : Jesus de Oliveira Campelo, Amilcar de Souza -Leão e Jayme Andrade. Finança Konsilantaro : Arnon Ribeiro Bezerra Vasconcelos e Severi na Pereira Lima dos Santos.

## ASSOCIAÇÃO ALAGOANA DE ESPERANTO: Nova Estraro

Jen estas la nova estraro de Associação Alagoana de E-o (Centro Educacional Antônio Go mes de Barros - Av. Fernandes Lima s/nº - Farol - 57.000 - Maceió - AL ), elektita la llan de junio lasta : Prez. - Ezequias Alves, Vicprez. - Aristophio Filho, Sek. - Nancy de Medeiros Silva, Kas - Maria Neide Barros Fontes, Bibl. - Maria Therezinha Carlos de Almeida Mendonça.

## D-ro SADLER EN BRAZILO

Tuj post la XVI Brazila Seminario de Esperanto, inter la 25/7 kaj la 10/8, D-ro Victor Sadler, eks-generala direktoro de UEA, vizitos plurajn brazilajn urbojn por pli bone ko ni nian landan movadon.

Belo Horizonte ( 21-24/7 ), São Paulo ( 26-27/7 ), Bauru ( 28-29/7 ), Londrina ( 30/7 ), Cascavel (31/7), Curitiba (3/8), Sorocaba (4/8), Santos (5/8), Volta Redonda (6-7/8), Rio de Janeiro (8-9/8), Juiz de Fora (10/8) estas la vizitotaj urboj de D-ro-Sadler.

## VIZITU ORIENTON SENPAGE

Se vi deziras informiĝi pri tiu miriga ebleco, ne hezitu postuli la unuan numeron de ORIENTA ESPERANTISTO (kontrau pago de unu respondkupono) al: Matur Turizm Oficejo - P.K. 149 - Bursa - TURKIO.